

Raporto de la Jarkunveno

Inter multaj aferoj diskutitaj ĉe la jarkunveno de SEA, la 30an de Marto, estis pritraktita la afero inviti Internaciajn Esperantajn Organizaĵojn kongresi en Sudafriko. Trae esploringe miajn rimedojn cele al inviti iun estontan UK-on ĉi tien la Estraro decidis ke, antaŭ ol tion fari, ni antaŭe ekzercu nin provante gastigi jarkunvenon de almenaŭ unu malpli granda organizaĵo, kiel ekz. ILEI, IKEL aŭ NEM. *

Pri student-agado: Krom la Potchefstroma Universitato, kiu jam kvin jarojn subtenas E-o klubon, ankaŭ ESPERAŬTO, la klubo ĉe Johannesburga Univ.to, funkcias kun 14 studentoj lernantaj pere de Jen Nia Mondo. Ĉe Wits. magistriĝos studentino kun tezo: The Linguistic Structure ... of Major Auxiliary Languages, kaj tiucele lernis Esp-on. Pluan sektion pri Interlingvistiko intencas starigi ŝia Profesoro, kiu por ĝi volonte akceptos kiujn ajn aliajn studentojn. Pri Esp-o instruas iun studentinon ĉe PE Universitato s-ino A. Fouché, kiu gastparolis (dufoje) ĉijare Rotariajn Klubojn kaj E.P. Writers Club, ankaŭ kunlaboris en radio-programo. Krome, ŝia premiita artikolo pri Esp-o aperis en Evening Post. La PEKanoj skribis eksperimentan ekzamenon (790508) de la Royal Society of Arts, kiun kontrolis s-ro F. Woolf, kies komentoj pri la rezulto montris sufiĉe alta la nivelon ĝenerale atingitan.

En 790905 mortis la PEa Prezidanto, s-ro Henk de Rover, veterana Esperantisto. S-ro Cobus Zeelie, antaŭa komitatano, portempe transprenis la oficon.

Reelektiĝis la Estraro, kiu formis la antaŭan. Dum la jaro ĝi kunvenis kvin fojojn. La venonta kunveno okazos 800522 en la hejmo de la Prezidanto.

++++++

* ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

IKEL: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj.

NEM: Neŭtrala Esperanto-Movado.

La nomo de la studentino kiu magistriĝos estas f-ino Gail Parkin.

(Raportis: s-ro A. von Blottnitz.)

++++++

Por akiri bonan pozicion en la mondumo, oni penas laŭpove ŝajnigi, ke oni ĝin jam akiris.

- La Rochefoucauld.

LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIOP.O. Box 1227, Cape Town.PREZIDENTO: s-ro E. de Kock.VIC-PREZIDENTO: s-ro A. von Blottnitz.SEKRETARIO: s-ro O. Sher.KASISTO: s-ro C.S. Beckford.KOMITATANOJ: s-rino A. Fouché; s-roj H.W. Appel,
J. van D. Strydom, F.M. Woolf.ENHAVO

Raporto de la Jarkunveno	1
Estraro	2
Esperanto: Parolaĵo de la Mondo	3
Pri nia Ortografia Artikolo	4
Nelastaj Vortoj de la Supersignoj	5
kaj daŭrigo	6
La Brasilia Kongreso 1981a	7
Trilingva Artikolo	8
ankaŭ ĉi tie	9
Inter Ni ... !	10
La Vulpo kaj la Kapro	11
Recenzoj	12
Venteraĵoj	13
Pli Rev' ol Vero	14
Deziras Korespondi	15
El nia Gramatiko	16

(Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT, 8060;
Tel. 44.2657; helpe de s-ro C.S. Beckford; tel.
22.6326).

Ĉiuj oficistoj, kaj verŝajne ankaŭ diplomatoj en la ĉefoficejo de la Unuiĝinta Naciaro en Novjorko, povis legi la 1½-paĝan artikolon 'Esperanto: parolaĵo de la mondo', kiu aperis en la gazeto de UN, SEKRETARIEJAJ NOVAĴOJ (Secretariat News) de 1980-02-29. Liveris la artikolon UEA mem, kun foto de E-kurso okazinta en la nova oficejo de UEA en Novjorko. (Cetere, ĝian inaŭguron ĉeestis s-ro Robert Muller, sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN).

Al ni estas imageble, ke granda parto de la legintoj de la artikolo trovas Esperanton solvo de la babeleco de UN, sed ke, aliflanke, buŝ-kaj papertradukistoj, kiuj vivtenas sin profitante el la lingva problemaro, psike ne facile povas akcepti la pretendon de Esperanto, ĉar la fina solviĝo de la lingva problemolaŭ ili - minacos al ili senlaborecon. Tiuflankan argumenton ni bezonas havi.

Ja estas brila atingo, ke la grava gazeto de UN komencis serioze taksi la valoron de Esperanto, post la artikolo en 1977 pri monda diplomato parolanta Esperanton.

+++++

Parolado de d-ro H. Tonkin en UNESKO:

D-ro H. Tonkin, kiel estrarano pri eksteraj rilatoj de UEA, ĉiam kaptas la okazojn de sia vizito al Eŭropo por viziti Uneskon. Propraokule li konstatas kelkfoje, ke la intervenoj de UEA ĉe UNESKO povas efiki.

Preskaŭ ĉiuj komentoj de UEA pri raporto de Internacia Komisiono pri Komunikaj Problemoj de UNESKO estas akceptitaj en ĝia definitiva raporto. S-ro Tonkin prelegos unuafoje en UNESKO antaŭ la oficistoj de ĝiaj lingvaj servoj pri Esperanto kaj lingvaj problemoj.**

Dokumentoj Anglaj:

En la anglalingva serio de Esperanto-dokumentoj, eldonataj de UEA, aperis interesaj traktaĵoj jenaj: TRADUKADO EN INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ de s-roj Claude Piron, kaj Humphrey Tonkin, kaj LINGVA EGALCO EN INTERNACIA KUNLABORADO de s-ro Ralph Harry.

+++++

La 'Jardeko por Virinoj' (1976-1985), proklamita de UN, ankoraŭ estas aktuala. Ekaperis bulteno SEKSO KAJ EGALCO en Oktobro, 1979a. Ĝi estas malferma al diversaj informoj kaj opinioj el la tuta mondo. Kiel sendependan novaĵleteron ĝin redaktas s-ino Anna Brennan en la centra oficejo de UEA en Roterdamo.

- El 'UN kaj Ni'.

Ni tuj agnosku, ke ni, en post-komento al la artikolo 'Ni Parolu pri Faktoj' en la antaŭa numero de B.E., intence komunikis la impreson, do, kun la lango malantaŭ la vango, ke ni konsentis kun la 9-punkta argumento de Prof. Guéguéniat, koncerne sugestitan plibonigadon de la Esperanta ortografio.

Tion ni faris por ĝenerale veki intereson, kiel ankaŭ inciti membrojn, esperante, ke ili ensendos siajn opiniojn kaj kontraŭargumentojn, ĉar ni bone sciis, ke estas ĝenerale konate, ke nia redakcio senrezerve subtenas la principojn difinitajn en la Fundamento. La legantaro laŭnombre sufiĉe bone respondis, iuj eĉ kol-eris pri nia ŝajna starpunkto 'duonkaŝita', kaj esprimis sian surprizon tiurilate, kompreneble supozante nin seriozaj. Al ili ni esprimas nian bedaŭron, kun la sento ke, 'la celo pravigas la rimedojn'. Ni elkore dankas ĉiujn tiujn, kiuj kontribuis al la tre aktuala diskuttemo nun troviĝanta en la movado.

El la kontribuaĵoj, elstara estas tiu de s-ro H.W. Appel, nia komitatano, kiu, en sia 9-punkta letero, detalis ne malpli ol 47 specialajn literojn (eĉ tajpis ilin ĉiujn!) okazantajn en diversaj lingvoj, ĉiu kun sia aparta supersigno! Ili fontas el ne malpli ol 16 lingvoj, ĉiuj Eŭropaj, kaj krom la hispana, invertita '!'. La fina punkto de s-ro Appel legiĝas: Homoj aŭ instancoj, kiuj ne havas intereson por Esperanto pro la unikaj kvalitoj, kiujn ĝi nun havas, certe ne ŝanĝos en adeptojn, se la lingvo perdus siajn supersignojn.... Grava obstaklo venkenda estas la pasiveco inter ni. Tion ni ŝanĝu, ne nian alfabeton. Bedaŭrinde, ke la limigita spaco ne permesas plenan represadon de la letero de s-ro Appel, kiu mirinde klare kaj detale esprimas tutcerte la opiniojn de la plejmulto de Esperantistoj.

Ni ĉi tie atentigu pri artikolo verkita de s-ro Bernard Golden el Hungarujo titolita NELASTAJ VORTOJ PRI LA SUPEF SIGNOJ. Se ekzistas homo, kie ajn, kiu ankoraŭ kredas, ke la forigo de la supersignoj faros la ĝeneralan akceptadon de nia lingvo pli bona projekto, li certe konvinkig-igos en la kontraŭdirekton post legado de la artikolo.

+++++

Kiom ajn ni malfidas la sincerecon de niaj alparolantoj, ni ĉiam kredas, ke ili diras al ni pli vere ol al la aliaj.

- La Rochefoucauld.

La inicialoj OEO signifas Optimala Esperanto-Ortografio, kies aŭtoro estas Albert Lienhardt, emerita fervoja inĝeniero kaj fakdelegito de UEA, unu el la plej novbakitaj reformproponistoj por 'plibonigi' Esperanton.

Se oni ekzamenas profunde kaj objektive la demandon pri supersignoj en Esp-o, oni povas lerni interesan lecionon. Tiaj projektoj venis kaj iris kiel la vento, kaj neniu el ili havis eĉ la plej malgrandan efikon sur la klasikan Esperanton. La argumentoj kontraŭ la uzo de diakritaj signoj en Esp-o estas tute senbazaj. Ekzemple, mi legis leteron al la redakcio de itala ĵurnalo, en kiu la skribinto opiniis Esperanton netaŭga por moderna uzo, ĉar ne estas eble telegrafi tekstojn kun supersignitaj leteroj! Sensencaĵo! Pluraj eŭropaj lingvoj havas literojn kun kromsignoj, sed la telegrafistoj facile povas elturniĝi helpe de digramoj. Simila solvo estis elpensita en Esp-o. Oni uzas 'h' anstataŭ la cirkumflekso. Kiel ofte okazas, obstakloj troviĝas nur en la cerboj de etmensuloj, ne en la realo. En la 92-jara historio de Esp-o, ĉiuj proponoj por reformoj, sen iu ajn escepto, fiaskis, dank' al la komuna saĝeco de la esperantistaro, kiu ne permesis, ke lingvaj plibonigistoj tuŝaŭ ilian lingvon. Laŭ mia scio, estas nur unu solvo, kiun la reformemuloj ankoraŭ ne elpensis: la forigo de ĉiuj literoj de la Esperanta alfabeto, por ke restu nur la supersignoj! Ankaŭ la reformsistemo ellaborita de s-ro Lienhardt estas destinita trafi en la abismon de forgeso, ju pli frue, des pli bone. Erara estas lia aserto, ke la ĉapelitaj literoj faras Esperantlingvan presadon kaj eldonadon malpraktika kaj malekonomia. Prestiĝaj neesperantistaj eldonejoj publikigas librojn en Esp-o: The English Universities Press; E.P. Dutton, New York; Oxford University Press. Gravaj mondkonataj firmoj ne elspezas monon por akiri supersignitajn litertipojn cele al la idealisma subteno de Esp-o. Kiam presejoj kaj fabrikoj de tajpiloj kaj kompostmaŝinoj trovos, ke ekzistas merkato por aparatoj havantaj la Esperantan alfabeton, ili senhezite provizos la klavarojn de siaj maŝinoj per la bezonataj literoj. Ankaŭ venos la tempo kiam organizaĵoj devos konstati, ke la dungado de armeo da interpretistoj kaj tradukistoj estas pli multekostaj ol la adopto de la Internacia Lingvo, eĉ se komence estiĝas relative grandaj elspezoj por lingvoinstruado kaj modifo de preseja ekipaĵo. Jam montriĝis per la malfavoraj recenzoj, kiujn ricevis OEO, ke ĝi estas kondamnita al malsukceso kaj neniam ŝancelos la Fundamenton. Povas esti, ke Lienhardt allogos kelkajn malkontentulojn, kiaj ĉiam ekzistas en Esperantujo. Post la naskiĝo de Esp-o, aperis pluraj 'plibonigitaj' kaj pli

'perfektaj' planlingvoj, sed nek la publiko, nek oficialaj instancoj montris pli da interesiĝo pri ili.

Kiu konas la historion de la klopodoj prezenti Esperanton al la Ligo de Nacioj dum la 1920aj jaroj memoros, ke la afero fiaskis, ne pro iaj difektoj en Esp-o mem - ne sonis eĉ unu pepaĵo pri supersignoj - sed pro la akra kontraŭstaro de francparolantaj lingvaj ŝovinistoj. Hodiaŭ similaj sociopolitikaj sintenoj malantaŭ la kulisoj de UNO kaj UNESKO silentigas ĉiujn proponojn solvi la Babel-problemon per internacia lingvo.

Laŭ sia titolo, tiu ĉi artikolo ne enhavas la plej lastajn vortojn pri la supersigna demando. Post OEO certe venos ankoraŭ pli novaj proponoj, kiujn la prudenta esperantista popolo daŭre ignoras.

(Bernard Golden. Mallongigita).

(Ĉu verkita antaŭ la ricevo de lasta BE, enhavanta la artikolon de s-ro Lienhardt, aŭ ĝuste pro tiu artikolo, ni ne scias, sed ni tre dankas s-ron Golden, ke li ĵetis tiom da lumo sur tiu ĉi tre aktuala temo, prezentante ĝin tiel vastaspekte. Se ankaŭ aliloke presita, ni esperas, ke ĝi ĝuos tiom da sukceso el propaganda vidpunkto, kiom ĝi meritas. -Redakcio).

+++++

Ne nur ordinaruloj, sed foje ankaŭ altranguloj havas monproblemojn. Inter tiuj troviĝis la angluja reĝino, kiu pro monmanko estis devigita vendadi pomojn! Ŝi ja ricevas altan ĵarsalajron, sed la plejgranda parto de tiu estas uzata por pagi la palacoficistojn, kaj teni la palacon mem bonorda kaj bonstata, lasante malmulton por ŝi mem. La reĝino ja ne kolportas pomojn surstrate! Ŝi nur ĵurnale anoncis, ke pomoj estas vendataj ĉe ŝia bieno en Norfolk. Tia plebana agmaniero estis nepripensebla en pli bonaj, pli feliĉaj epokoj, kiam ekzistis granda aparteco inter reĝidoj kaj la ordinara homo.**

En Israelujo, tiu mirinda nuntempa lando, troviĝas ĉiuj nuancoj de la judaisma religio, inkluzive de grupo Neutrei Karta, kiu ne rekonas la ŝtaton Israelujo (tamen loĝas en ĝi). Ili pretendas, ke estus sakrilegio fondi hebrean ŝtaton antaŭ ol venos la Mesio. Same ili malaprobas la uzadon de la hebrea lingvo sur ĉiuj paperaĵoj - tio estu uzata nur por preĝoj. Ili preferas praktiki sian religion sub nehebraj regantoj kaj tial deziras, ke Israelujo fariĝu la 5a ŝtato de Usono, ke ilia loĝkvartalo en Jerusalemo fariĝu ero de iu araba ŝtato. ** - El 'Die Burger'.

La 57a Kongreso okazos venontan jaron en Brasilio. Tiu estos la unua kongreso en la Suda Duonsfero kaj relative proksime apud ni. Se vi iros ĝis la Limpopo rivero aŭ iomete pli nor- den kaj poste flugos okcidenten, vi pli malpli trafos la urbon Brasilia, kiu troviĝas iom norde de la tropika linio. Kiel in- formis s-ro Grattapaglia (ĉefdelegito) la vintra klimato de tiu regiono multe similas tiun de la 'Laeveld' aŭ de Rodezio - ali- vorte, estas tre agrable por homoj frostotremantaj pro niaj malvarmaj regionoj. Krome, estas la senpluva sezono kun sia agrable seka, senvapora aero, sed tre malagrable tempo por Bra- silanoj kiuj jam alkutimiĝis enspiri pli da akvovaporo ol da aero. Do, estas la devo de sudafrikaj samideanoj amase ĉeesti la unuan kongreson en nia najbareco.

Plua afero: Aŭstraliaj kaj Novzelandaj kongresantoj povas 'mor- tigi du muŝojn per unu frapo' restante kelkajn tagojn en Sud- afriko survoje al aŭ revene de la Kongreso, vizitante la Kruger- sovaĝbestojn kaj aliajn vidindaĵojn. Same, homoj de Eŭropo, Israelujo, eĉ Japanio unue devas atingi la Sudan Duonsferon. Tion ili ordinare faras flugante al Nordameriko kaj de tie su- den al Brasilia, sed ili ankaŭ povas atingi la Sudan Duonsferon flugante voje de Nairobi al Sudafriko, regali la okulojn per la lokaj vidindaĵoj kaj poste daŭrigi sian vojaĝon al Brasilia. Ili eĉ povas iri al la Kongreso laŭ unu el la du vojoj kaj hejm- en iri laŭ la alia. Tiamaniere eksterlandaj Esperantistoj sur- voje al la 1981a Kongreso konatiĝos kun eble estonta kongres- lando! Kiu kuraĝas antaŭdiri ... ?

E.S.V.

+++++

Iu s-ro Graham Coote de Kaburbo, trumpetisto ĉe orkestro, tro- viĝis antaŭ la magistrato pro tio, ke li posedis .303 pafilon sen permesilo. Li klarigis, ke li prelegas ĉe lernejoj pri muzikiloj de la trumpeta familio kaj ĝenerale uzas la pafilon por montri, ke oni povas muziki per ia ajn malsolida tubo. La magistrato petis, ke li montru kiamaniere li muzikas per pafilo, kaj poste liberigis lin. Laŭtempe s-ro Coote ricevis invitilon perpafile muziki ĉe la porpalica balo. **

Kopenhaga konstruisto tiel koleriĝis kiam la poŝtisto alportis ordonon pagi enspezimpoŝton, ke li tiun perforte elĵetis el la loĝejo, piedfrapis lin malsupren tri ŝtuparojn, ĵetis du botel- ojn de lakto al li, ŝiris lin de lia biciklo, disĵetis la sakon de leteroj kaj fine saltis sur la enhavon kuŝantan surstrate. Pro tio li estis sendita malliberejen tri monatojn. **

- El 'Die Burger'.

In 'n veelvolkige land is dit moeilik om nasionale feesdae te vind wat vir alle bevolkingsgroepe aanvaarbaar is, juis omdat elke groep bepaalde dae het wat slaan op groot geleenthede uit hul eie verlede. Daarom is dit verblydend dat 'n kommissie waarin gekleurdes ook sitting gehad het, aanbeveel het dat 6 April weer heringestel moet word as openbare vakansiedag, onder die benaming Stigtersdag.

Dit kan miskien nie al die puriste bevredig nie, wat sou verkies dat dit of Van Riebeeckdag of Stigtersdag genoem moet word. Deur die klem effens te verskuif sodat dit nou op die stigting van Suid-Afrika val, en nie hoofsaaklik op die stigter nie, word dit vir alle bevolkingsgroepe moontlik gemaak om aan hierdie dag deel te hê en om hul eie aksente daaraan te gee. 'n Goeie voorbeeld is juis dat die 1820 Setlaarsvereniging aangedui het dat hulle geen beswaar sal hê as Setlaarsdag verval nie, aangesien Stigtingsdag dieselfde doel kan dien.

Suid-Afrika is een van die min lande in die wêreld wat nie alleen die naam van sy stigter ken nie, maar ook die presiese datum van sy stigting. Ons weet dat Jan van Riebeeck op 6 April 1652 die grondslag van ons staat gelê het, maar meer nog: ons besit ook 'n notule van ons vordering as staat, wat vanaf die heel eerste dag noukeurig bygehou is.

En multgenta lando estas malfacile establi naciajn festotagojn akcepteblajn al ĉiuj popolgrupoj, ĉar ĉiu grupo havas iujn tagojn memorindajn pro okazaĵoj el sia propra pasinteco. Tial, ĝojige estas, ke komisiono entenanta homojn alikolorajn rekomendis, ke oni restarigu la 6an de Aprilo kiel komunan libertagon nomitan Fondado-tago.

Eble tio ĉi ne kontentigos ĉiujn puristojn, kiuj preferus, ke ĝi nomiĝus Van Riebeeck Tago, aŭ Fondinto-tago. Iomete forŝovante la emfazon tiel, ke ĝi falu sur la establado de Sudafriko, kaj ne necese sur ĝia fondinto, oni faras tion ebla al ĉiuj popolgrupoj partopreni la tagon kaj ĝin propraguste reliefigi. Bona ekzemplo estas, ke la 1820 Koloniista Asocio jam sciigis, ke ĝi ne protestus, se Koloniista Tago malaperus,

Ĉar Fondado-tago povus same bone taŭgi.

9

Sudafriko estas unu el la malmultaj landoj en la mondo, kiu ne nur konas la nomon de sia fondinto, sed ankaŭ la precizan tagon de sia fondiĝo. Ni scias, ke la 6an de Aprilo Jan van Riebeeck fundamentis nian ŝtaton. Pri nia progreso kiel ŝtato ni ankoraŭ posedas registron, precize tenatan, ĝuste de la unua tago.

In a multinational country it is difficult to come up with national holidays that are acceptable to all population groups because each group has certain days memorable for events in its own past. That's why it's encouraging that a commission which included people of other colours recommended that April 6 should be reinstated as a public holiday and called Founders' Day. Perhaps this will not satisfy all the purists who would have preferred it to be called Van Riebeeck Day or Founders' Day. By slightly shifting the emphasis to fall on the establishment of South Africa and not necessarily on its founder, it is being made possible for all population groups to share in the day and give it their own emphasis. A good example is that the 1820 Settlers' Association has indicated that it would have no objection to Settlers' Day falling away as Founders Day could serve the same purpose.

South Africa is one of the few countries in the world that not only knows the name of its founder but also the exact day of its foundation. We know that on April 6, 1652, Jan van Riebeeck laid the foundation of our state. We still have a record of our progress as a state, carefully kept from the very first day.

+++++

Novaj homoj el Rusujo, kiuj amase aperis en Okcidenta Ukrainio, faris impreson, ke ili unuafoje renkontiĝis kun civilacio. Tio nature dependis, de kiu loko venis la koncerna homo. Certe Rusaj vilaĝanoj ne konis sufiĉe bone polan banĉambron. En Rusujo oni ofte uzadis vaporbanadon, kies iloj tute ne similas al okcidenta bankuvo. Polo scivoleme demandis rusan soldaton kiel plaĉas al li nova banĉambro.

"Tute ne komforta. Mi devas tro profunde kliniĝi por lavi aŭ razi la vizagon kaj se mi tiras la ŝnurtirilon la akvo tro rapide fluas kaj mi ne sukcesas eluzi la falantan akvon".

Antaŭ eble du monatoj la samideanoj de Kaburbo havis la plezuron konatiĝi kun s-ino Judith Sherwood el Champaign en la ŝtato de Illinois, Usono, dum ŝia restado en Sudafriko por tri monatoj kiel prelegisto en la Universitato de Okcident-Kablado pri la uzado de komputeroj en la lokaj Edukad-sistemoj, kaj ankaŭ kiel instruisto pri la skribado de programoj. Ŝi estas flua parolanto de Esperanto, kun alloga amerikana elparolmaniero. Ŝi ek-lernis la lingvon en iom eksterordinara maniero, se ne diri iom amuzan. Ŝi kaj ŝia edzo veturis Italion, kie s-ro Sherwood akiris novan postenon instruan. Lia edzino akompanis lin ĉiufoje kiam li konversaciis kun la Italoj, kaj tiumaniere grade eklernis la aŭskultitan lingvon, dume supozante, ke ĝi estas la itala, ne sciante, ke ĝi fakte estas Esperanto!

S-ino Sherwood revenos al Usono voje de Johannesburgo, poste iros al Vancouver en Kanado, kie ŝi ĉeestos la ELNA Kongreson (Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko), ĝuste antaŭ la Universala Kongreso en Stokholmo. Ŝi verkis publikigitajn Enkondukajn Lecionojn en Esperanto por uzantoj de komputeroj. **

Ni esprimas niajn elkorajn bondezirojn al André, la plej aĝa filo de ges-roj Edwin de Kock, kaj Carol, filino de ges-roj A.L. van der Spuy, kiuj geedziĝis la 29an de pasinta Junio, kiel ankaŭ al la gepatroj mem de la juna paro.

Ni gratulas s-ron J. van D. Strydom, membron de nia komitato, kiu antaŭ nelonge doktoriĝis en sia fako, tiu de edukado. Ni salutas lin pri lia sukceso. **

La estraro de SEA jam dum pli ol jaro pridiskutis la neceson aperigi Esperanto-lernolibron por la Afrikaans-parolantoj en Sudafriko. Ne necesas atentigi, ke multaj homoj en nia lando trovos tion pli facila lerni Esperanton pere de sia hejmlingvo, do tia verko kapablos doni grandegan antaŭenpuŝon al nia afero en Sudafriko. Iuj estraranoj, kiel ankaŭ kelkaj aliaj membroj, okupiĝas organizi laborplanon. Tiucele, ili jam posedas kajeron, iam verkitan de Prof. D-ro N.J. v.d. Merwe, de Pretoria Universitato, kiu, kun lia permeso, formos la bazon por la tasko. Ni ne havu iluziojn pri la grandeco de la entreprenoj, ĉar mankas gvidlinioj, sed ni fidele akceptas, ke ĝi aperos en deca tempo. **

En puton falis, en ĝi sidis
la vulpo, laca jam plu salti,
subite ĝoje ĝi ekvidis
ĉe l' supra rando kapron halti.
Demandis tiu: "Kio okazis?
Kial vi sidas en obskuro?"
"Nenio okazis" - ĝi emfazis -
"jen, vere, loko de plezuro!
Ĉi ombra freŝo estas rara
ĝuego, kiel balzamŝmiro
la akvo estas freŝa, klara,
saniga kiel eliksiro.
Kaj dum vi en varmego tia
suferas de soif' kaj ŝvitas,
mi ... ej! mi estas senenvia.
Ensaltu, kore mi invitas."
La kapro saltis. Sen prokrasto
la ruza besto sin eksvingis
al ĝia dors', kaj per vostkvasto
velante, saltis plu, atingis
la supran randon de la puto,
elgrimpis - kaj tre bone fartis.
Malsupre en konsterna mutio
la povra kapro ĝin rigardis.
Kaj diris nun kun rid-rikano
de supre la ruzul' fripona:
"Nu, do adiaŭ! Sed baptano,
vi estas barbe pli impona
ol cerbe. Uzu jenan sperton:
Ĉe la enir' al iu loko
pri la eliro havu certon."
Kaj li foriris post ĉi moko.

LA HUNDO EN LA STALO.

La hundo antaŭ kripo kuŝis
kaj grumblajn bojojn ĝi elpuŝis,
se manĝi el aven' deziris
ĉevaloj. Tiam unu diris:
"Aveno estas en abundo,
kaj al ĝi tute ne necesas,
jen, tamen al ni ne permesas
ĝin manĝi la envia hundo."
- K. Kalocsay: Ezopa Saĝo.

SKIZOJ, de Peter Altenberg: La libreto konsistas el kolekto de diverstipaj, unupaĝaj kvazaŭmemoraĵoj de homo kiu, pro necerta sanstato, migris dum la pli granda parto de sia vivo tra la patrolando, observante kaj registrante siajn spertojn sur ĉiaj tavoloj kaj medioj. Ĉiu paĝo priskribas apartan travivaĵon, jen patosan, jen humuran, jen kortuŝan. Ĉiuj formas distran tutajon ne tre seriozan, kiu povus plenigi, pere de siaj 32 paĝoj, agrablan, unuhoran vakuon.

Ĝin elgermanigis Grete Breunlich en Marto, 1980a.

HISTORIO DE ESPERANTO, de d-ro Karl Beckman: La libreto (11 paĝa) estas supraĵa resumo de la necesaj informoj el praktika vidpunkto de la historio de Esperanto. Ĝi ja utilos al instruistoj kaj kursgvidantoj, ankaŭ al tiuj, kiuj ĝenerale verbas por la internacia lingvo. La kompilinto verŝajne deziras instigi al studoj laŭeble pli profundaj. Ĉar ĉi tiu skizo pritraktas nur la Eŭropan Esperanto-movadon, ĉu ne estus dezirinde suplementi ĝin per io simila pri la orientaj landaj, kiel ekzemple Ĉinio aŭ Japanio?

La kompilinto estas direktoro de la Aŭstria Esperanto-Instituto en Vieno, kiu eldonis ambaŭ la ĉi-suprajn librojn. Lingvaĵo senmanka.

F.M.W.

+++++

Venis en nia n manojn la 16a numero de la Filologojrevuo de la Internacia Unuiĝo de la Esperantistaj Filologoj, IUEF, en Sofia, Bulgario. Por iom prilumi tiun ĉi apartan fakon de lingvostudado, la PIV difinas ĝin: Filologio: Scienco, kiu helpe de la historio, literaturo, arkeologio, mitologio, folkloro, esploras la lingvojn kiel organojn de la spirita vivo de la popoloj. Do, ne objekto kies pristudo estu facilanime entreprenota! Malgraŭ tio, mirinde estas diri, ke al tiu ĉi seriozmiena "klubo" apartenas grandnombra membraro estiĝanta el la plimultaj eŭropaj landoj, kiel ankaŭ el Usono, se ne paroli pri Sudafriko, kaj pri nia sekretario mem, s-ro Oskaro Sher kies nomo, kiel nova membro, aperas en la ĵus eldonita numero, kune kun multaj aliaj. Kiel ekzemplo de la serioza naturo de la presaĵo, neniu alia ol s-ro Bernard Golden pritraktas la "Devenon de la Esperanta sufikso -UL" sur ne malpli ol 4 paĝoj en treege erudicia, multescia kaj neatendite interesa disertacio. Pri ĉio volonte informos plue s-ro Sher. **

Iu John Williams de loko apud Kaburbo troviĝis antaŭ la magistrato pri akuzo de kontraŭleĝa alkoholaĵ-komercio. Laŭ esploro fare de detektivo, li estis aĉetinta iom malpli ol 600 botelojn da diversspecaj drinkaĵoj dum tri monatoj. Li neis la akuzon kaj senkulpege deklaris, ke lia edzino devas drinki multon por ebligi al ŝi mamnutri ĝemelojn. Krome, li mem trinkas multon kaj ofte troviĝas kuntrinkantaj vizitantoj. La detektivo tamen trovis nur dek tri malplenajn botelojn en kaj ĉirkaŭ la domo kaj ne la centojn kiuj ja devus troviĝi tie.

- El 'Die Burger'.

Abel Rosal kaj Rute Maria Viera de Brazilo geedziĝis kaj gastoj lasis donacojn - io tute ordinara, sed inter ili ĉi-foje troviĝis io malpli ordinara - ĵus naskita infaneto en kartona skatolo kune kun letereto. Ĝi estis donaco de patrino kiu ne 'kapablas eduki lin'.

- El Transvaler.

Familio en loko apud Wankie, Rodezio, posedis hundeton kaj malsovaĝan korvon, kiuj malgraŭ rasa malsimileco estis grandaj amikoj. Okazis, ke la hundeto dum ses tagoj forestis, ŝajne malaperis. La korvo videble malĝojis pro tio, sed oni rimarkis, ke la birdo ne tute manĝis sian manĝaĵon, kaj ke ĝi forflugis kun peco da tio, post nelonge revenis kaj denove forflugis similmaniere. Sekvinte la korvon la geedzoj trovis la hundon en bestkaptilo kie, dank' al la alportita manĝaĵo, ĝi ankoraŭ troviĝis en bona sanstato.

- El 'Die Burger'.

La entrepreno Lever Brothers de Londono ordonis al siaj 2 000 laboristinoj ne porti ŝuojn kun najlpintaj kalkanumoj ĉe la laborejo ĉar ege difektiĝas la plankoj. Pere de esploroj oni konstatis, ke virino kun pezo de 112 funtoj per tiaj kalkanumoj faras premon de unu tuno sur kvadratcolo, dum viro kun pezo de 224 funtoj, portanta ordinarajn ŝuojn, premas nur 28 funtojn.

- El 'Die Burger'.

La Venter familio de Bellville posedas ruĝmakulan katinon kies malantaŭa korpoĉuono estas tre leporsimila, kaj laŭ ŝiaj antaŭaj posedantoj ŝi estas kuniklokata hibrido. Ŝi ne ŝatas la kunes-ton de aliaj katoj, preferas plantdevenan manĝaĵon kaj kontraŭe al aliaj katoj, ŝi ne timas akvon. Se ekpluvas, ŝi tuj kuras eksteren. Hundmaniere ŝi estas tre atakema kiam temas pri fremduloj.

- El 'Die Burger'.

Nigrulo de Kaburbo kiu ebrie biciklis surstrate devis pagi la kutiman monpunon kaj aldone la magistrato ordonis, ke dum ses monatoj li ne biciklu sur publika vojo.

- El 'Die Burger'.

(Hazarde - kion magistrato farus, se ebria virino puŝus infanĉareton sur publika strato?).

Sensperta nur junulo kaj preskaŭ nur infan',
 De l' sorto frufrapita naiva homaran'
 Revadis pri feliĉo, pri amo reciproka
 Dum sangis lia koro en urbo Bjalistoka. -
 Sufera atestanto tro frue de pogrom',
 Vekiĝis en infano jam voloforta hom',
 Kaj li ofere forĝis la ilon de l' kompreno
 El sia propra koro, el amo kaj ĉagreno;
 Kaj multvalora kerno sin kaŝis sub la ŝelo:
 "Interna la ideo" - jen estis la juvelo!
 Magie ĝi ekbrilis, kun forto de mister'
 Komencis la miraklon de Paco sur la Ter'.

Sed ve! - forpasis jaroj...argenta jubileo...
 Plenvive pulsas Lingvo, sed velkas jam l' Ideo!
 Kaj vane fuŝpoetoj pri ĝi banale rimas,
 Per vortoj ĝi ne vivos, - almenaŭ mi ĝin timas -
 Kaj ruzaj praktikuloj ne plu bezonas ĝin,
 Do mortu la Ideo laŭ plaĉo de l' destin'!
 Ĝi estis utopio, infana nur afero,
 Kaj pli agrable tintas la sono de monero.
 Jes, prave, ho filistro, vi turnu tiun paĝon
 Kaj plue kun profito disvendu do fromaĝon!
 En arta skatoletto, kun Esperanta Moto,
 Ĝi tra la mondo iros ĝis ĉe la Hotehtoto. -

Ĉu ne, samideano, mi ŝparu la rimarkojn,
 Vi tamen nur bildflanke kolektos poŝtajn markojn,
 Vi tamen amindumos, sen risko, sendanĝere,
 Kun ĉarma fremdanino poŝtkarte aŭ letere,
 Vi tamen reveturos al kiu ajn kongres'
 Kaj ĝojos...se la balo finiĝas kun sukces'!
 Vi kantos emocie kun plore pia sento
 La himnon de l' espero kaj de l' facila vento;
 Konfuze vi remiksos la Homan Familion
 Kaj pli profitan ismon kaj eĉ Filatelion,
 Kaj dum vi fanfaronos pri daŭra pac-spirito
 Per osta pugno frapos rikane vin Milito...

Ĉar, ke l' Esperantistoj por paca la batal'
 Kunvenas sub la ŝildo de Majstro-Ideal',
 Ke nun ankoraŭ kreskas rapide la afero,
 Jam estas, bedaŭrinde kaj ve! - pli da Rev' ol Vero.

- Raymond Schwartz: Verdkata Testamento.

Kara s-ro,

Mi estas studento en Tehnion en Haifa kaj mi lernas Esperanto-kurson. Mi havas 22 jarojn, kaj mi tre deziras ke studentoj en via lando skribu al mi. Ĉu vi povus doni mian adreson al iuj studentoj. Tre sincere dankas,

Leib Benjamin,
Beilis 6, Haifa, Israelo.

Estimata s-ro Direktoro,

Mi estas hungara lernantino, kaj volus korespondi kun lernanto en la oka klaso. Ĉu vi konvolus doni mian adreson al taŭga lernanto en simila klaso en via lernejo? Mi tre multe dankas vin.

Anikó Gotthard,
Pécs 7628, Krúdy Gyulo u 14.

33-jaraĝa komencantino serĉas korespondamikojn en Greklando. Skribu al Maria Nikolova, Str. P.Xaramincev 26, 5140 Laskoveta, Bulgario.

38-jaraĝa matematikisto interesiĝas pri bildkartoj, klasika pentroarto, kinoartist(in)oj, plenkoloraj libroj. Skribu al Jaroslav Matvijšyn, do Vostrebovanija, USSR.

18-jara studentino f-ino Veronica N. Gumbach, Dr. Carbone 3215, 1676 - Santos Lugares, Buenos Aires, pri muziko, opero, teatro kaj turismo.

26-jara Krzysztof Mikulski, 293 720 Drogobytch, Gargarin St., 130/4, USSR, Ukraine, pri fremdlingvoj, aŭtomobiloj, radio, kaj skribi leterojn.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, s-ro Mehmet Telyakar, Aydinlik sok. n-ro 23, Ortaköy-Istanbul, Turkio.

Legantoj estas petataj plenumi unu aŭ pli el la ĉi-supraj adresoj la korespond-dezirojn en ili esprimataj, kiom eble. Ni ja konfesas, ke ĉiam mankas aŭ tempo, aŭ la deziro, aŭ eĉ la intereso en tiaspeca letterskribado, tamen eĉ unufoja pacienstreĉo ne malutilus al sufiĉe neordinara konatiĝo kun fremdul(in)o sur la alia flanko de la terglobo (Red.)

+++++

Pri la vorto "siatempe"...

Diri "iam" anstataŭ "siatempe" ni en la plimulto da okazoj ne povas, ĉar la senco de ambaŭ vortoj estas malsama. "Iam" esprimas tempon nedifinitan, dum "siatempe" esprimas tempon kvankam ne klare nomitan, tamen pli-malpli difinitan. "Mi volis siatempe proponi regulon" = "mi volis proponi en iu tempo, kiam, laŭ mia opinio, la cirkonstancoj tion postulis". Se anstataŭ "siatempe" vi diros "ĝiatempe", vi ne faros eraron, sed ŝajnas al mi, ke en la plimulto da okazoj "siatempe" estas pli bona ol "ĝiatempe". Tiamaniere uzas la vorton ne sole tiuj lingvoj, kiuj por "sia" kaj "ĝia" uzas la saman vorton, sed ankaŭ tiuj lingvoj (ekzemple la slavaj), kiuj severe faras diferencon inter "sia" kaj "ĝia". Laŭ mia opinio oni povas klarigi ĝin al si per tio, ke "sia" montras pli grandan intimecon inter la faro kaj la tempo, ol kiom montras la vorto "ĝia". Gvidi nin per teoriaj postuloj gramatikaj en ĉi tiu okazo ni ne povas, ĉar al kiu ni povus rilatigi la vorton "ĝia"? Ŝajnas al mi, ke en la esprimo "faro ĝiatempa" la tempo apartenas (t.e., estas konvena, konforma, ktp.) al io ALIA, dum en la "faro siatempa" la tempo apartenas al la faro mem. Kompreneble, mia klarigo ne prezentas ion absolute konvinkan, sed mi volis nur montri al vi, ke ne ekzistas ia grava kaŭzo, por ke ni la ĝis nun komune uzatan "siatempe" anstataŭigu per "ĝiatempe".

(L.L. Zamenhof - Lingvaj Respondoj).

Ni havas egalan rajton uzi la "ĉi" ANTAŬ aŭ POST la pronomo (aŭ adverbo) sed ĉar la "ĉi" estas tiel forte ligita kun sia pronomo, ke ili ambaŭ prezentas kvazaŭ unu vorton, kaj ĉar tiu kvazaŭ-unu-vorto per la loko de sia akcento faras impreson de neharmonia escepto inter ĉiuj vortoj de Esperanto, tial pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi la "ĉi" ANTAŬ la montra vorto. La uzado de streketo inter la montra vorto kaj "ĉi" ("tiu-ĉi aŭ "ĉi-tiu" anstataŭ "tiu ĉi" aŭ "ĉi tiu") ŝajnas al mi nur simpla erara kutimo, kiun nenio pravigas.

(El la sama fonto).